

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

54-a jaro - n° 1  
Januaro - Februaro 1962

Demandu provveturon per  
la nova

# Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj  
ĉirkaŭaĵoj

## GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

# Sonorilo


oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE  
ROOSE FERNAND, SINT-KLARAĎREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81  
MAERTENS GRÉGOIRE

KUNLABORANTOJ AL REGULAĴ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL  
BRUNO DENOËL

COUWENBERG F.  
DE MARRÉ LUC  
DE CUYPER GEORGES  
ISERENTANT ROGER  
POUPEY CHARLES



ASOCIO SEN PROFITA CELO  
DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTOJ

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTA

SIELENS HENRI

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD  
JAUMOTTE MAURICE

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232, ANTWERPEN TEL. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 44 RUE DU TEMPLE, COURCELLES (HAINAUT)

KASISTINOJ

TERRYN JUBETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT  
VAN HERCK-HUYSMANS, MAX ROOSSTRAAT 28, BRUSSEL 3  
28 RUE MAX ROOS, BRUXELLES 3

REPREZENTANTO DE UNIVERSALO ESPERANTO-ASOCIO

COUWENBERG F., KONINGINNELAAN 14, BLANKENBERGE  
P.K. NR 4161.35

POŝTKONTOJ DE B.E.F. :

DE LA ANTAŬA R.B.L.E. : 1337.67 BRUSSEL - BRUXELLES  
FLANDRA LIGO : 2321.50 GENT

# Bonvenon

Bonvenon en la nova Federacio, diras al vi. Karaj Legantoj, ĉe tiu renovigo de la jaro, la du Prezidintoj de R.B.L.E. kaj F.L.E., kiuj ekde la 1-a de januaro, kune kaj en plej amika spirito, kungvidas la novan organismon, kiu naskiĝis el la cindroj de la du Ligoj, kiuj sinof-eris por stariĝi en nia lando unu, pli fortan, neŭtran propagandan societeton.

Ni, kiuj iniciatis tiun kunfandiĝon kaj, dum la tuta jaro 1961, la-boris por konduki ĝin al bona celo, ni ĝojas ĉar ni survoje renkontis, kun kelkaj malfacilaĵoj, multe da bonvolo kaj da komprenemo.

Ni ĝojas ĉar, kiam ni, por la unua fojo, kunvenigis kune la dele-gitojn de ĉiuj grupoj ĝis tiam aliĝintaj al la du Ligoj aparte, la spirito evidentiĝis tiel bona ke, en nur unu kunsido, povis esti forŝovitaj ĉiuj malfacilaĵoj.

Kaj tiel, en tiu ĉi januara numero de nia nun komuna revuo, ni povas kun fiero konstati ke la dueco ĉesis ne nur sur la liglabora kam-po, sed ankaŭ sur la tereno de la revuoj: kaj eĉ, — kvankam tie ne jam povis realiĝi plena kunfandiĝo, — sur tiu de la du Institutoj, kiuj same, ekde la 1-a de januaro, stariĝis en Bruĝo, *Komunan Oficejon*, kiu prizorgas, en la nomo de ĉiuj, la mendojn en la eksterlando kaj ankaŭ povos, dank'al detala kono de la stokoj, plirapidigi la alsendon de la menditaĵoj.

La unua tasko de la nova administrantaro kaj de la estraro estos nun eltiri el la nova situacio kaj por la movado ĉiujn profitojn, kiuj ŝajnas akireblaj el ĝi.

Ni devos esplori en kiuj regionoj, en kiuj urboj kaj urbetoj, la nova Federacio nun kalkulas kernojn de kelkaj ĝis nun disaj samide-anoj, kiuj, per unuigitaj fortoj, eble povos ion entrepreni.

Ni devos, por la revuo, varbi stabon de bonvolemluloj (sed kies bonvolemo estu iom daŭra kaj precipe regula), kaj sur kiuj ni povos nin apogi por certigi la ĝustatempan aperon de la revuo, kiu, dum 1962, vizitos vin almenaŭ OK-foje.

Ni devos klopodi altigi, ne nur la nombron, sed ankaŭ la nivelon de nia membraro, en tiu ĉi senco ke ni devos ĝin pliinteresi al la ĝe-nerala movado, al ĉio kio okazas eksterlande... Ankaŭ al la nun abunde aperanta literaturo, pri kiu ni rajtas fieri, ĉar ĝi, en la dek lastaj jaroj, certe atingis multe pli altan valoron ol kiam ajn antaŭe.

Via administrantaro kaj via estraro ja *volas* tion ĉion fari... Sed ili konscias ke tion ili *povos* realiĝi plene, nur se vi ĉiuj, niaj fidelaj membroj kaj legantoj, apogos ilin kaj volos helpi.

La du subskribintoj ne dubas ke vi *emas* tion fari. Ili esperas nur, ke vi trovos la tempon kaj precipe la kuraĝon, por realiĝi *vian emon*, por la plej granda bono de la movado en nia kara lando.

Tio estu nia nura, sed tre firma deziresprimo ĉe la komenco de tiu ĉi nova jaro de nova, komuna laboro.

Gerard Debrouwere.

Maurice Jaumotte.

# Belga Esperanto-Federacio

## Ĝia stariĝo

Post intertraktadoj inter la gvidantoj de ambaŭ Ligoj, okazis fine kunveno de du delegacioj de po kvin membroj indikitaj de R.B.L.E. kaj F.L.E.

Tiuj ĉi dek delegitoj difinis la grandajn liniojn de ebla solvo al la problemo de la dueco de la neŭtra movado en nia lando.

Akordiĝe inter la du estraroj, estis tiam kunvokita en Bruselo, la 7an de oktobro, kunveno, kiun ĉeestis preskaŭ ĉiuj gvidantoj de ambaŭ Ligoj.

La du estraroj anoncis la stariĝon de "*Belga Esperanto-Federa-cio*" kaj, tuj, ĉiuj ĉeestantaj prezidantoj de grupoj, aliĝintaj ĝis nun al unu el ambaŭ Ligoj, esprimis la intencon aliĝi al la nova Federacio.

Konstatinte tiun ĝeneralan deziron, la kunvenintoj decidis la stari-ĝon de la Federacio kaj tuj formis la provizoran ĝeneralan kunsidon, kiu elektis provizoran administrantaron.

Tiu ĉi, — tuj dum la sama posttagmezo, — ekzamenis projekton de Statuto, kiun la komuna estraro antaŭmetis. Post diversaj ŝanĝetoj, la teksto estis provizore akceptita.

Kaj nova ĝenerala kunsido de la membroj estis anoncita por la 4a de novembro, denove en Bruselo kaj en la salono de "Monico Nord".

Dum tiu dua kunsido, la ĉeestantoj akceptis definitive la Statuton kaj ekzamenis tekston de Regularo pri Interna Aranĝo. Ankaŭ tiu ĉi estis akceptita.

Fine, la kunsido elektis la unuan definitivon administrantaron de la societo, laŭ la akceptita Statuto de la Federacio, kiu alprenos la formon de "societo sen profita celo".

Kaj, tuj poste, kunsidis la administrantaro, kiu decidis ke, por la jaro 1962, la du ĝisnunaj estraroj, kunsidante kune, estos la "Komuna Estraro" de la nova Federacio.

Niaj legantoj trovos, en la sekvontaj paĝoj, la liston de la admi-nistrantoj, la funkciojn de la diversaj estraranoj, la Statuton kaj la Regularon pri interna Aranĝo. Tiujn tekstojn ni publikigas en tiu ĉi unua numero, por ke ĉiu membro posedu, ekde la komenco, ĉiujn gra-vajn dokumentojn, kiuj ebligas kaj faciligas la vivon de la nova orga-nizaĵo.

## Estraro

En sia decembra kunsido, la estraro de B.E.F., kiu laŭ decido de la administrantaro, konsistos, dum 1962, el la du ĝisnunaj estraroj de

R.B.L.E. kaj F.L.E., dividis la funkciojn provizore jene :

Prezidantoj : S-roj Maur. Jaumotte kaj Ger. Debrouwere.

Vicprezidantoj : S-ino J. Plyson. S-roj F. Roose, P. Denoël, Cortvriendt kaj F. Couwenberg.

Generala Sekretario : S-ro Luc De Marré.

Nederlandlingva sekretario : S-ro Gr. Maertens.

Franclingva sekretario : S-ro Georges de Cuyper.

Kasistinoj : F-ino J. Terry kaj S-ino R. Van Herck-Huysmans.

La eldonon de la revuo prizorgos ĉefe S-ro F. Roose, akordiĝe kun S-ro Jaumotte.

La U.E.A.-aferojn prizorgos S-ro Couwenberg.

La Komuna Oficejo kaj Aĉetkontoro de BEI kaj FEI estos estrata de S-ro R. Iserentant.

#### Administrantaro

La administrantaro konsistas en unua vico el delegitoj de la Grupoj, elektitaj proporcie al la nombro de la membroj :

AALST : F-ino P. de Cock.

ANTVERPENO : S-roj Jaumotte, L. De Marré, J. Verstraeten, R. Balleux kaj F. Schellekens (La Verda Stelo) ; S-ro F. Volders (Flandrema Grupo).

BLANKENBERGE : S-ro Couwenberg.

BRUĜO : S-roj F. Roose kaj G. Maertens (Paco kaj Justeco) ; S-roj Ch. Poupeye kaj De Meulenaere (B.G.E.).

BRUSELO : S-roj R. Jacobs kaj J. Oleffe.

CHARLEROI : S-ro R. Paulus kaj F-ino Orselini.

GENTO : F-ino Terry kaj (Flandra) kaj F-ino Is. Van Parijs (RBLE).

KORTRIJK : S-ro Debrouwere.

LIEĜO : D-ro Denoël.

LOVENO : S-ino Meurrens.

VERVIERS : S-ro J. Koeune.

WIJGMAAL : F-ino Hanquinet.

Krome la prizorgantoj de la UEA-aferoj kaj de Institutoj estas laŭregulare administrantoj : S-ro Couwenberg (UEA) ; S-ro R. Iserentant (Komuna Oficejo de BEI kaj FEI.)

Ĝis la triono de sia membronombro, la administrantaro povas alekti pliajn administrantojn kooptajn. Ili estas :

S-ino J. Plyson - Pastro De Maeyer, Grafo G. de Cuyper, S-ro Kam. Van Hulle, S-ro Ger. De Boes, S-ro Lemme (Lieĝo) kaj S-ro Cortvriendt.

Estas konsilantoj : la Honora Prezidanto D-ro Paul Kempeneers kaj la Honora Vicprezidanto S-ro Henri Sielens.

## la nova titolo de nia revuo

La nova titolo de nia komuna revuo, organo de " Belga Esperanto-Federacio " estas, kiel vi jam vidis per la kovril-paĝo : " *Sonorilo* ".

La elekto de tiu ĉi titolo ne okazis hazarde.

En la vorto " *Sonorilo* " kuŝas la simbola ideo ke, je tiu ĉi momento de la rekunigo de la neŭtra movado en nia lando, ni volas solene aŭdiĝi per vigla sonorigado, la alvokon, kiun ni direktas al ĉiuj, por ke ili, ekde nun, senescepte aliĝu al ĝi ; tiel ke ni, estonte, rajtu paroli nome de ĉiuj samideanoj, ankaŭ de tiuj kiuj ĝis nun aŭ en la lastaj jaroj, restis ekster la neŭtra movado.

La nomo " *Sonorilo* " havas tamen ankaŭ alian aspekton kaj signifon.

Per ĝi, ni reprenas tradicion. La unua revuo, kiu en la komenco de tiu ĉi jarcento ekaperis en nia lando nomiĝis " *Belga Sonorilo* ". Ĝi estis eldonata, propramone, de Komandanto Lemaire, la unua prezidanto de " *Belga Ligo Esperantista* ". Tiu revuo baldaŭ iĝis la unua oficiala organo de tiu ĉi Ligo, ĝis kiam, en 1908, la Ligo Prezidanto iĝis idisto kaj komencis defendi siajn skismemajn ideojn en sia revuo.

Kelkaj fideluloj el Antverpeno kaj Bruĝo tiam tuj starigis novan revuon, kies nomo estis " *Belga Esperantisto* " kaj kiu intencis defendi kaj ĉiam daŭre defendis, la principon de la fideleco al la Zamenhofa Esperanto.

Kaj de 1908 ĝis 1961 " *Belga Esperantisto* " daŭrigis sian vivon.

Intertempe alia revuo ankaŭ fondiĝis en nia lando : " *Flandra Esperantisto* ", kiu iĝis la organo de " *Flandra Ligo Esperantista* ".

Estas dank' al la ĝemeligo, al la komunigo kaj unuigo de ambaŭ la revuoj " *Belga* " kaj " *Flandra* ", ke ni nun povas prezenti al niaj legantoj sub tiu ĉi malnova, nova titolo " *Sonorilo* ", nian revuon, kiu estu *nia* organo en la vera senco de la vorto : ne organo oficiala de Federacio ; sed organo vivanta de ĉiuj membroj de tiu Federacio.

Ni do, soncrole, alvokas la kunlaboremulojn ĝenerale, — kaj ĉiujn sekretariojn de la grupoj speciale, — por ke ili kunlaboru ; tiuj ĉi lastaj, per regula ensendo de " *kroniketo* " pri la vivo de siaj grupoj.

Por la dua numero, ni petas ilin tion fari *senprokraste*, ĉar nia intenco estas ke, ekde nun, nia revuo vizitu niajn membrojn, kiel eble plej regule.

Kaj la " *Sonorilo* " antaŭdankas.

S.

GRAVE : La nuna numero de *Sonorilo* estas eldonata por la monatoj januaro kaj februaro ; la tekstoj por la numero de marto devas esti en la posedo de la redaktoro plej laste la 28-an de la nuna monato, sed por la numero de aprilo, kiu aperos komence de aprilo ni devas disponi pri la tekstoj plej laste la 15-an de marto. Helpu la redaktoron !



SUR LA TOMBO DE IVAN ZEKOV EN BRUSELO.

Sur la tombo de la bulgara samideano Ivan Zekov, de pluraj jaroj membro de la Brusela Grupo esperantista kaj iama kunlaborinto en la preparaj laboroj de la 45a U.K., kaj kiu subite mortis antaŭ kelkaj monatoj la ĉefurbaj samideanoj organizis ceremonieton simplan sed kortuŝan, dum kiu alparolis la foririntan amikon la Prezidanto S-ro René Jacobs, kiu memorigis liajn meritojn kaj ankaŭ la fakton ke la lokaj esperantistoj kunigis siajn modestajn rimedojn por starigi la beletan monumenton, kiun prizorgis S-ro Jirousek kaj kiun fotografis S-ro Piron.

Sur la fotografajo ni vidas plurajn el la partoprenantoj, kiuj ĉirkaŭas la prezidanton kaj S-ron G. C. Fighiera, malantaŭ la tombo.

#### U.N.E.S.C.O.-NOVAĴOJ.

Kiel parto de sia laboro stimuli la instruon de internacia interkompreno, Unesco eldonis serion de diagramoj, kiuj enhavas fotojn, mapojn kaj bazan informon pri ok eŭropaj landoj: Belgujo, Britujo, Danlando, Francujo, Okcidenta Germanujo, Hispanujo, Jugoslavio kaj Sovet-Unio.

La serio estis planita simile al kolekto pri ok aziaj landoj, kiun Unesco kaj la Nacia Instruista Sindikato de Britujo kune eldonis en 1959. La azia serio, kiu temis pri Cejlono, Filipinoj, Hindujo, Indonezio, Japanujo, Kamboĝio, Pakistano kaj Tajlando, fariĝis tre populara en lernejoj en kaj orientaj kaj okcidentaj landoj. Oni do decidis reldoni ĝin en septembro 1961 samtempe kiel la eŭropan diagramaron.

Ĉiu aro de diagramoj kunhavas porinstruistan broŝuron, kiu donas fonan informon kun speciala emfazo pri la ĉiutaga vivo de la popolo. La teksto estas verkita de kompetentaj geografoj kaj edukistoj de la koncernaj landoj. La Internacia Geografia Unio kunlaboris. La lingvoj de la broŝuroj estas nur franca kaj angla, sed oni preparas pliajn broŝurojn kun nur ilustraĵoj por tiuj, kiuj volas presigi aliaj lingvojn en ilin.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo)

## Statuto de la Belga Esperanto-Federacio

publikigita en la anekso de la ŝtatgazeto de la 18.1.1962

S-ro Maurice Jaumotte, industriisto, Belgo, loĝanta en Wilrijk, De Bruynlaan, 44,  
S-ro Gerard Debrouwere, industriisto, Belgo, loĝanta en Kortrijk, Magdalena-  
straat, 29.

S-ro Luc De Marré, profesoro, Belgo, loĝanta en Antwerpen, Groenendaallaan, 232,  
S-ro Gregoire Maertens, ŝtatafunkciulo, Belgo, loĝanta en Sint-Kruis, Prins Leopold-  
straat, 51.

respektive prezidantoj kaj sekretarioj de « Reĝa Belga Ligo Esperantista » kaj de  
« Flandra Ligo Esperantista », kiuj ligoj ambaŭ decidis estonte daŭrigi kune siajn  
klopodojn en la sino de nova societo;

Volante starigi tiun societon, sen profita celo, inter si kaj la estintaj membroj  
de ambaŭ antaŭnombritaj ligoj, kaj ankaŭ ĉiuj personoj kiuj aliĝos pli poste;

Difinis la statuton de tiu societo, jene:

Par. 1-a: La Societo estas starigita sub la nomo: « Belga Esperanto-Federacio » (Belgische Esperanto-Federatie; Fédération Belge pour l'Espéranto).

Par. 2-a: La sidejo de la societo estas fiksita en Wilrijk (Antverpeno), sed  
povas esti translokita, kien ajn en Belgujo, per nura decido de la administrantaro.

Par. 3-a: La ĉefa celo de la societo estas: la progresigo, per ĉiuj taŭgaj rimedoj kaj precipe en propra lando, de la internacia lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas kunmetita de sia aŭtoro, D-ro Zamenhof; kaj fare de la postsekvintaj decidoj de la Akademio de Esperanto; la reprezentado de la Esperanto-movado antaŭ la naciaj kaj lokaj aŭtoritatoj kaj antaŭ la publiko; la plivastigo, pere de Esperanto, de la rilatoj inter Belgujo kaj aliaj landoj kaj interalie la diskonigo de la nederlandlingva kaj franclingva kulturoj.

Por atingi siajn celojn, ĝi povas efektivigi aŭ organizi prelegojn, kursojn, eldonojn, ekspoziciojn, kongresojn kaj vojaĝojn; tiucele apliki ĉiujn necesajn rimedojn kaj fondi organizaĵojn.

Pere de la societo aŭ en ĝi ne povas esti farata propagando, kiu ne estas konforma al tiuj celoj.

Par. 4-a: La membronombro estas ne limigita, sed devas almenaŭ atingi dek. La membroj povas aliĝi al la federacio ĉu individue, ĉu pere de grupo.

Par. 5-a: Minimume la du trionoj el la membroj devas esti Belgoj.

Par. 6-a: Membreco estas definitiva post akcepto de la administrantaro, pri kiu parolas la paragrafo 9a, kaj kiu decidis sen motivigo. Membroj, kiuj agas evidente kontraŭ la celoj de la societo, povas esti eksigitaj fare de la administrantaro.

Par. 7-a: La jara minimuma kotizo estas fiksita je dudek frankoj, la maksimumo je mil frankoj.

Par. 8-a: Membroj povas ĉiumomente forlasi la societeton, sendante sian eksigon per letero al la prezidanto.

Membroj, kiuj ne pagas la ŝulditan kotizon, estas konsiderataj kiel eksigantaj.

Par. 9-a: La societeton administras administrantaro konsistanta el almenaŭ ses membroj elektitaj de la ĝenerala kunsido inter la membroj, ĝis la sekvonta ĝenerala kunsido. Ilin ĉiam povas eksigi tiu sama kunsido.

Par. 10-a: La administrantaro havas plej kompletan kompetentecon por la administrado de la societo. Ĉio, kio ne estas, laŭ la statuto aŭ laŭ leĝo, nepre rezervita al la ĝenerala kunsido, restas en la kompetenteco de la administrantaro.

La administrantaro redaktas regularon de interna ordo, kiu difinas pli detale kiel la societo devas plenumi la statuton. Tiu regularo estas submetota por aprobo al la unua sekvonta ĝenerala kunsido.

La prezidanto estas devigata kunvoki la administrantaron post motivita peto subskribita de tri administrantoj.

Par. 11-a: La administrantaro elektas la estraron, kies plimulto konsistu el administrantoj.

La estraro konsistas almenaŭ el prezidanto, unu vicprezidanto, unu ĝenerala sekretario kaj unu kasisto. Ĝi entenas plie unu nederlandlingvan kaj unu francalingvan sekretariojn, kiuj estas kompetentaj pri la Esperanto-informado en sia respektiva lingvoregiono.

La estraro plenumas la decidojn de la administrantaro kaj prizorgas la ĉiutagan gvidadon de la societo. Urgajn decidojn povas preni la estraro, kondiĉe ke ili estu submetataj por aprobo al la unua sekvonta administrantaro.

Par. 12-a: Ĉiuj aktoj, kiuj ligas morale aŭ finance la societeton, devas esti subskribitaj de la prezidanto kaj de la sekretario ĉu de la prezidanto kaj kasisto.

Par. 13-a: Procesojn iniciatas en nomo de la societo kiel plendanto aŭ sekvas kiel defendanto, la administrantaro, persekute kaj diligentece de la prezidanto.

Par. 14-a: Ĉiujare devas okazi la ĝenerala kunsido dum la monato marto.

Par. 15-a: Kunvokoj okazas per nura publikigo en la organo de la societo aŭ per ordinara cirkulero perpoŝte sendita kiel presajo. Ili mencias la tagordon. La kunsido povas tamen preparoli punktojn kiuj ne aperas sur la tagordo.

La kunsidoj kaj la nomigoj okazas kaj la decidoj estas alprenataj laŭ la kutimaj reguloj de la interkonsiligaj kunvenoj.

Koncerne la voĉdonrajton, ĉiu membro ĉeestanta la ĝeneralan kunsidon, rajtas je unu voĉo.

Ne ĉeestantaj membroj povas sin reprezentigi de iu ĉeestanta membro provizita de skriba mandato.

Par. 16-a: La societa jaro komenciĝas la 1-an de januaro kaj finiĝas la 31-an de decembro.

Ĉiujare estas fiksita la kalkulo de la pasinta societa jaro kaj starigita la budĝeto de la sekvonta jaro. Ambaŭ dokumentoj estas submetotaj al la ordinara ĝenerala kunsido.

La ĝenerala kunsido povas modifi la statuton laŭ la kondiĉoj de paragrafo 8-a de la leĝo de la 27-a de julio 1921-a.

Par. 17-a: La likvido de la societo okazas laŭ la kondiĉoj de paragrafo 20-a de la menciita leĝo.

Eksiginta aŭ eksigita membro, aŭ la heredantoj de formortinta membro, konservas nenian rajton je la societa havaĵo, eĉ ne en okazo de likvido de la societo.

Par. 18-a: Okaze de likvido, kiam kaj kial ajn, la neta aktivo, restanta post pagado de la ŝuldoj kaj enordigo de la debetoj, estas laŭ decido de la ĝenerala

kunsido, dividata inter la grupoj, kiuj ĝis tiam partoprenis en la societo aŭ, ĉe malesto de tiuj grupoj, donacita al iu grupigo aŭ organizaĵo kiu sin okupas plue pri la propagando por Esperanto, aŭ ankau al « Universala Esperanto-Asocio » aŭ alie al iu Belga organizaĵo kun bonfara celo kaj internacia karaktero.

Par. 19-a: Estas nomitaj kiel membroj de provizora administrantaro: la membroj de la estraroj de ambaŭ nomitaj ligoj, kiel ankau la prezidanto, unu vicprezidanto kaj unu sekretario de ĉiu grupo, kiu dum la hodiaŭa kunveno, petas aliĝon al la nova societo.

Tiu provizora administrantaro havas kiel solan taskon la redakton de tiu parto de la estonta regularo pri interna ordo, koncernante la proponon de kandidatlisto por la enoficigo de la administrantoj.

Post difino de tiu procedmaniero, okupos sin S-roj Maur. Jaumotte, kiu prezidis la hodiaŭan kunvenon, samtempe en nomo de S-ro Gerard Debrouwere, kaj Gregoire Maertens, kiu redaktis la protokolon, pri la publikigo de tiu ĉi statuto en la Belga Statgazeto, post kio ili kunvokos ĝeneralan kunsidon de la membroj, por elekti la definitivan administrantaron, kiu tiam povos enoficigi la unuan definitivan estraron.

Tiel redaktita en Bruselo, la 7-an de oktobro 1961-a.

## REGULARO PRI INTERNA ORDO

(laŭ paragrafo 1-0-a de la Statuto)

### I. ADMINISTRANTARO KAJ ESTRARO.

Par. 1-a: A. — Ĉiu grupo rajtos reprezentigi sin en la Administrantaro de unu membro por ĉiu komenciĝinta kvindekda membroj, enskribitaj en la grupo, je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro.

B. — Ĉiu komenciĝinta deko da reprezentantoj de la Federacio (vidu par. 9-a) kaj ĉiu komenciĝinta dudeko da izoluloj povas proponi unu administranton.

C. — La perantoj de UEA kaj la gvidantoj de la libro-institutoj estas administrantoj.

D. — La administrantoj antaŭviditaj sub A kaj B rajtas proponi al la ĝenerala kunsido liston de kooptaj administrantoj ĝis unu triono de sia nombro.

Par. 2-a: La prezidanto kaj tiuj (vicprezidantoj kaj sekretarioj), kiuj povas esti vokitaj por lin anstataŭi ĉe foresto aŭ malhelpo, devas esti administrantoj, kiel ankau la kasisto.

La ĝenerala sekretario respondecas pri la ĝenerala korespondado kun oficialaj instancoj kaj aliaj asocioj aŭ personoj kaj aplikas la paragrafojn de la statuto, kiuj rilatas la kunsidojn ĝeneralajn kaj administrantarajn.

La regionaj sekretarioj helpas la ĝeneralan sekretarion kaj respondecas pri la Esperanto-informado en la senco de la direktivoj de U.E.A. koncerne la informo-centron en ĉiu lando. Ili prizorgas interalie la korespondajn kursojn, la gazetarajn servojn kaj la ekspozician servon.

Paragrafo 3-a: La oficiala lingvo en la kunvenoj de la Federacio estas Esperanto.

### II. ORGANO

Par. 4-a: Kiel ligilo inter siaj membroj, la Federacio eldonas revuon, se eble ĉiunmonatan, sub titolo: « Sonorilo » Organo de Belga Esperanto-Federacio.

Ĉiuj presajtoj estu en Esperanto, escepte okaze de nepra bezono kaj kun aprobo de la estraro.

La administrantaro delegas unu el siaj membroj kiel ĉefredaktoron de tiu revue kaj se necese alian personon kiel administranton por la materiaj laboroj kaj la anoncoj.

### III. GRUPOJ KAJ REPRESENTANTOJ.

Par. 5-a: Esperanto-grupo aŭ izolaj esperantistoj, kiuj deziras aliĝi al la Federacio, petas tion skribe al ĝia ĝenerala sekretario.

Peto de grupo devas esti subskribita de ĝia prezidanto kaj de ĝia sekretario. Al tiu peto estos aldonita: a) kompleta membrolisto kun nomo, antaŭnomo, nacieco, profesio kaj adreso de ĉiu membro, kaj por la membroj malpli ol dudek kvinjaraj, ankaŭ la naskiĝdato; b) ekzemplero de la grupa statuto aŭ de projekto de statuto.

Par. 6-a: Ĉiu grupo kaj ĉiu reprezentanto enkasigas ĉiujare la kotizojn kaj transpagas al la federacia kasisto la parton destinitan al la Federacio.

Pa. 7-a: Estas konsiderataj kiel plenrajtaj membroj de la Federacio:

- a) la subtenantaj membroj
- b) la plenaĝaj membroj
- c) la junulaj membroj (malpli ol dudek-unujaraj)
- d) la kadetaj membroj (malpli ol dekokjaraj)
- e) la enloĝantaj membroj (familianoj de membroj sub a kaj b loĝantaj al sama adreso).

La kotizo de la membroj sub a, b, c, kaj d entenas la abonon al la federacia revuo.

Par. 8-a: La administrantaro povas akcepti, ĉu senpere, ĉu pere de la grupoj, la aliĝon de simpatiantoj kiel « Amikoj de la BEF ». Tiuj « Amikoj » ne estas membroj de la societo; ili povas ĉeesti la kunvenojn de la Federacio kaj de la grupoj, sed havas nur konsilan voĉdonrajton.

Par. 9-a: En lokoj, kie ne ekzistas grupo, la Federacio povas nomi reprezentanton, kies ĉefa tasko estos klopodi por fondi lokan grupon.

Par. 10-a: Sur ĉiuj dokumentoj, la grupoj sekvigu la titolon de sia grupo, per la mencio: « aliĝis al Belga Esperanto-Federacio ».

Par. 11-a: Krom jam ekzistantaj esceptoj, la Federacio havu laŭprincipe nur unu grupon en sama loko aŭ aglomeracio. Se, en iu loko, pli ol unu grupo ŝajnas utila, la administrantaro povas akcepti alian grupon.

### IV. LIKVIDO.

Par. 12-a: Okaze de likvido de iu grupo aŭ de iu reprezentanta ofico (vidu par. 9-a), la tuta propraĵo transiros al la Federacio. Tamen tiu propraĵo restos dum tri jaroj je la dispono de eventuala nova organizaĵo aŭ de nova reprezentanto en la sama loko aŭ aglomeracio.

### V. VOĈDONADOJ.

Par. 13-a: Ĉiuj decidoj estos alprenataj per simpla plimulto de la voĉoj, escepte en la laŭleĝe antaŭviditaj okazoj. Ĉe voĉegaleco, la voĉo de la prezidanto estas decidiga.

### VI. KONGRESOJ.

Par. 14-a: La estraro organizu laŭ ebleco ĉiujare kongreson aŭ semajnfinan renkontigon laŭ speciala regularo aprobota de la administrantaro.

## Belga kaj Flandra Esperanto-Institutoj

Ekde la momento kiam komenciĝis la intertraktadoj antaŭvide al la reunigo de la neŭtra movado en nia lando, ekstaris samtempe la demando pri la estonta, pli intima kunlaboro de la du Institutoj, kiuj ĝis nun aparte laboris en sama teritorio.

La gvidantoj de la du Institutoj havis, dum la lastaj tagoj de 1961, unuan kunvenon, dum kiu ili esploris la tutan problemon.

Evidentiĝis ke, pro la malsimila laŭleĝa formo de ambaŭ societoj, estas neeble tuj unuigi ilin komplete: Unu efektive estas Kooperativa Societo, t.e. societo kun iela komerca formo; la alia alprenis la formon de Societo sen profita Celo.

La gvidantoj tamen, unuanime, akordiĝis pri la principo, ke estas dezirinde kaj necese, ke la du Institutoj tuj kiel eble plej intime kunlaboru.

Tial ili decidis starigi en Bruĝo, — ekde la komenco de januaro 1962, — en la hejmo de S-ro R. Iserentant, kie estas la adreso de Flandra Instituto, « Komuna Oficejo kaj Aĉetkontoro », kiu kunigos ĉiujn mendojn, kuĵn ĝis nun la du Institutoj faris aparte ĉe la eksterlandaj librejoj kaj eldonejoj.

Por la individuaj kaj grupaj mendoj, ĉiu povas, — dum la jaro 1962 —, daŭrigi siajn mendojn kiel li faris antaŭe, do ĉu ĉe BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, en ĝia laŭleĝa sidejo: De Bruynlaan 44 Wilrijk kaj pagi alties P.C. N° 1689.58, ĉu ĉe FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO, Blankenbergse steenweg 72 Brugge kaj pagi al ties P.C. N° 3268.51.

La gvidantoj de ambaŭ organismoj prizorgos la kiel eble plej rapidan alsendon de la menditaj libroj, ĉu el Antverpeno, ĉu el Bruĝo, laŭ la konsisto de la stokoj.

Dum la jaro 1962, tiuj gvidantoj esploros la rimedojn por ankoraŭ pliintimigi la kunlaboron ĝis kompleta kunfandiĝo.

La Komuna Oficejo de  
Belga kaj Flandra Institutoj.

HET WELGEKEMDE  
MAGAZIN VOOR MODERNE HERENKLEDING

**in't duifken**

GROTE KEUS  
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - GABARDINEN - LODENS  
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Firma Van Iseghem & Verstraeten,

P.V.B.A.

ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN

VITRALOJ - SPEGULOJ - „SECURIT“ VITRO  
KOLORIGITAJ VITROJ  
ALUMINIAJ SENMASTIKAJ STANGOJ POR  
KUPOLOJ

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUAĴOJ  
MASTIKO

telefoon 37.88.20

### LA PAGO DE LA KOTIZOJ

Ĉar la nova Federacio ne jam disponis, ĉe la komenco de la jaro, pri sia poŝtĉekkonto, la estraro decidis ke, por la jaro 1962, la grupaj kasistoj kaj ankaŭ la individuaj membroj pagos, kiel ili faris pasintan jaron; do: al la Poŝtkonto de la Ligo, al kiu ili aŭ la grupo apartenis en 1961.

La Grupkasistoj sendu la liston de la membroj por kiuj ili pagas, en du ekzempleroj al sia ĝisnuna kasistino:

F-ino J. Terrijn, Raapstraat 72 Gento (por la antaŭaj membroj de F.L.E.).

S-ino R. Van Herck-Huysmans, Max Roosstrato 28 Bruselo 3 (por la antaŭaj membroj de R.B.L.E.).

La respektivaj poŝtkontoj estas: R.B.L.E. Bruselo N° 13.37.67  
F.L.E. Gento N° 23.21.50

La kotizoj pagotaj de la individuaj membroj estas por 1962 jenaj:

Bonfara Membro	150 F
Membro (kun abono)	100 F
Familia membr(in)o	50 F
Kadeto (18 ĝis 21-jara)	50 F
Infano (ĝis 18-jara)	25 F
Kursanoj	50 F
Abonoj	80 F

## G. FAES

16, Schoenmarkt, 16  
ANTVERPEN

★ Por via MUZIKO  
RADIO kaj GRAMOFONO

LES ENTREPRISES

## DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO  
Tel.: 15.19.92

Entrepreno de  
KONSTRUAĴOJ

por la komencantoj

### NAPOLEONO KAJ ESPERANTO

Vi certe pensas: "ĉu mi ĝuste legas? — ĉu la verkinto (1) ne estas freneza?"

Napoleono mortis antaŭ la naskiĝo de L. Zamenhof, ĉar temas pri (2) Napoleono I (= la unua). Kiel do oni povas paroli pri Napoleono kaj Esperanto?

Nu (3), Napoleono estis franca imperiestro kaj fama militisto (4). De tempo al tempo li faris traktaton (5) kun venkita malamiko.

Ĉu vi jam aŭdis pri la "Paco de Tilsit"? Tilsit estas urbeto, kie en 1807 renkontiĝis Napoleono kaj Caro Aleksandro de Ruslando. Inter ili ĵus (6) finiĝis sanga milito.

Kion enhavis tiu "paco", tiu traktato inter la du regnestroj? Multon. Unu punkto tamen interesas nin. Napoleono donacis (7) al la rusoj urbeton nomatan Bialistoko.

— "Ĉu Bialistoko estis franca urbo?" — vi certe demandos.

Fakte (8), ne. Napoleono simple prenis ĝin el alia lando, Prusujo, por doni ĝin al sia nova amiko.

Bialistoko estis do germanlingva (9) urbo, situanta (10) apud pola regiono, sub la regno de la rusoj. Ne mirinde se (11) poste en tiu urbo estis parolataj tri lingvoj: germana, pola, rusa.

Du kromaj (12) popoloj, kun sia propra lingvo, baldaŭ aldoniĝis al tiuj tri: la blank-rusa (rusa dialekto parolata de kamparanoj) kaj la juda (parolata de izraelidoj).

— Do, entute, kvin lingvoj? — Jes, vi bone kalkulas.

En kiu urbeto de la mondo estis parolataj kvin lingvoj? Eble nur en Bialistoko, kaj dank'al Napoleono!

La kvin lingvoj kaj la kvin popoloj vivis en malharmonio. Laŭ la konfeso de D-ro Zamenhof, tiu fakto kreis en li la deziron, verki lingvon internacian. La genio de la Majstro (13) faris la reston.

Ĉu vi ne opinias, kiel mi, ke Napoleono iom estas... la prapatro (14) de Esperanto?

- (1) verkinto: schrijver — auteur;
- (2) temas pri: het betreft — il s'agit de;
- (3) nu: welnu — or;
- (4) militisto: oorlogvoerder — guerrier;
- (5) traktato: traktaat — traité;
- (6) ĵus finiĝis: was juist geëindigd — venait de finir;
- (7) donaci: schenken — donner en cadeau;
- (8) fakte: feitelijk — en fait;
- (9) germanlingva: Duitstalig — de langue allemande;
- (10) situanta: gelegen — se situant = situé;
- (11) ne mirinde se: niet te verwonderen — pas étonnant si;
- (12) kroma: bijkomende — autres (supplémentaires);
- (13) Majstro: Meester — Maître (nom donné à Zamenhof);
- (14) prapatro: voorvader — ancêtre.



## AMIKOJ, KUNLABORU!

Estas banalajo aserti, ke la hodiaŭa junularo estas la morĝaŭa homaro. Tamen evidentiĝas, ke manko de gejunuloj en niaj vicoj, endanĝerigus la movadon.

Do estas kontentige, konstati ke multaj gejunuloj lernas nian lingvon.

Ĝis kiam vivanta societo ilin kunigos, nia "Sonorilo" estos utila ligilo ankaŭ por la gejunuloj.

Tiun celon havas nia "Junulara Angulo".

Tiu angulo devas vivi per la kunlaborado de multaj inter vi. Krom informaj sciigoj ni publikigos artikolojn verkitajn de junaj samideanoj.

Ne timu: per praktiko venas perfekteĝo. Verku! Skribu al ni, kion vi ŝatus legi en *via* angulo!

BRUNO.

## Por la gejunuloj, paroloj de Albert SCHWEITZER

"Nia epoko baraktas en la sensenco, kiel falinta ĉevalo baraktas en sia jungilaro. La ĉevalo povas ekstari nur se oni maljunĝas ĝin kaj ektiras ĝin per la kapo. Nia mondo ekstaras, nur se oni sukcesos ĝin konvinki, ke ĝia savo ne kuŝas en administraj mezuroj, sed en nova spiritostato".

La sperto pri la vivo, kiun la plenkreskuloj devas transdoni al la gejunuloj ne tekstas: "la vivo sin ŝarĝos por ruiniĝi vian idealismon...", sed prefere: "via idealo enkorpiĝu en vi tiel forte, ke la vivo ne povu forpreni ĝin de vi".

Multe da malvarmeco estas inter la homoj, ĉar ni ne kuraĝas montriĝi tiel koraj, kiel ni efektive estas.

La centro de «GRAJNOJ EN VENTO», la lernejoj rondo internaciaj, komunikas:

La Respublika Junulara Komitato de SLOVENIA ESPERANO LIGO en Ljubljana, Jugoslavio, akceptas gvidi la novan rondon de Grajnoj en vento por **estontaj geinstruistoj**. SEMINARIOJ, NORMALAJ LERNEJOJ, PORINSTRUISTAJ LERNEJOJ en ĉiuj landoj, aliĝu al la nova rondo! Aktive partoprenu, sendante al ĉi suba adreso en Jugoslavio tekstojn en 25 ekzempleroj pri via studenta vivo, viaj spertoj, pri pedagogiaj temoj, pri famaj homoj de via lando, pri ĉio — escepte de politikaj aferoj — kio povas proksimigi la homojn, laŭ la plej larĝa tolerema spirito. Sendu ankaŭ 25 desegnaĵojn (originalojn). Formato de la tekstoj kaj desegnaĵoj: 21 × 29,7 cm. Dato por la eldono de la unua komuna kajero: 1.3.1962.

Gvidantino de la rondo al kiu oni sendu la verkaĵojn:

Fino Marjana ZRIMSEK, Rudnik 60, LJUBLJANA, Jugoslavio.

Por aliaj informoj pri «GEV» oni sin adresu al «Grajnoj en vento», Marcel Erbetta, rue des Pins 66, **Bienne/Biel 7**, Svislando (aldonante, se eble, internacian respondkuponon).

Regule ni publikigos libroliston de la verkoj haveblaj ĉe ambaŭ Institutoj. La listo konsistos el 2 rubrikoj:

a) noveldonajoj aŭ aktualajoj:

b) malnovaj eldonoj pri kiuj multaj neniam aŭdis sed kiuj povas pliriĉigi la propran bibliotekon je tre favoraj kondiĉoj.

## A. Noveldonajoj aŭ aktualajoj

- Bildlibro pri Bestoj (belega albumo en koloroj pri ĉiuj bestospecoj de la tero; abunda teksto) 105,—
- Ĉina Antologio (lukse bindita ekzemplero) 100,—
- Serio de dek diversaj libretoj kun kolorbildo kaj abunda teksto por niaj infanoj; i.a. "Aladin kaj la mirinda lampo" — "La ratkaptisto de Hameleno" ktp) — Por la tuta serio de dek 100,—
- Laŭsistema studo de funkcioj (studlibro pri matematiko) 21,—
- Zamenhofa Esperanto (la jam fama ATA-ITA problemo laŭ la koncepto de spertuloj kiel I. Lapenna, Waringhien k.a.) 150,—

## B. Malnovaj eldonoj

- Ŝlosilvortareto Esperanto-Nederlanda (tre malmultekosta donaceto por viaj korespondantoj) 2,—
- Fundamento de Esperanto (ĉiu esperantisto bezonas nepre tiun taŭgan verketon) 10,—
- La Fino (historiaj detaloj pri la agado de grafo Folke Bernadotte dum la lasta mondmilito) 30,—
- Elektitaj Noveloj (de Lode BAEKELMANS) (konata Flandra verkisto en Esperanto traduko) 20,—

N.B.: la ĉi-supraj prezoj ne enhavas la sendkostojn.

B.E.I.: De Bruynlaan, 44, Wilrijk. PĈ 1689.58

F.E.I.: Blankenbergse steenweg, 72, Brugge. PĈ 3268.51.

Ceramiko de Loveno

Kreejo de Dekorativaj ceramikajoj

Dietse Vest 96

Loveno

## ESPERANTO kaj I.O.O.F.

Por ekzameni kion ni kune povos fari por Esperanto en nia Independent Order of Old-Fellow's, mi urĝe petas al la Esperantistoj-Membroj de I.O.O.F., sciigi al mi siajn nomojn kaj adresojn. Kun indiko, ĉu vi intencas partopreni la U.K. en Kopenhago. Volonte mi faros eventualajn preparajn laborojn.

Sed almenaŭ mi petas ĉiujn adresojn por ke ni povu interkontakti en la intereso de nia por-Esperanto laboro en I.O.O.F.

P. KORTE,  
Prins Bernhardlaan 19, Veendam  
(Nederlando)

### Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE S. P. R. L. Tel n-roj 223.01 - 225.37  
Du esperantaj markoj:  
TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

## Sekcio Antverpeno

### PROGRAMO

ATENTU: Pro eventualaj ŝanĝoj en la programo estas konsilinde ĉiam enrigardi la ĵurnalojn.  
(" Witte Leeuw ", Frankrijklei 4, je la 20a 15)

### FEBRUARO

Vendredojn, la 2an: Dokumentfilmoj de S-ro Van Eynde.  
la 9an: Parolado kun Lumbildoj de S-ino R. Lecat pri " Hispanujo ".  
la 16an: Bilda kaj Radiofona Teatraĵo.  
la 23an: Ĉirkaŭ la Fajro: ĉiaj kontribuajtoj.

### MARTO

Vendredojn, la 2an: Parolata ĵurnalo.  
la 9an: Parolado de S-ro R. Van Eynde pri " Aspektoj pri la Ekonomio en nia Lando ".  
Dimanĉon, la 11an: Vizito al la Instaladoj de la 2 Tuneloj. Kunveno je la 14.30a h. ĉe la enire ejo de la granda tunelo, antaŭ la Norvega preĝejo. Gvidanto: S-ro R. Van Eynde.  
Vendredojn, la 16an: Kultura Distra Vespero de S-ro R. Jaumotte.  
la 23an: Parolado kun Muziko de S-ro A. Faes pri " Printempa Atmosfero ".  
la 30an: Dokumentaj Filmoj de S-ro R. Van Eynde.

se vi parolas pri STROVI... vi pensas pri  
viandaĵejo. se vi pensas pri viandaĵejo... vi  
aĉetas ĉe

## STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:  
GARANTIO pri  
bona kvalito  
kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559  
detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ  
TRANSPAGOJ
- ★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA  
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo: ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



## VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



### PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	: Aalmoezenterstr. 2 Abdiĵstr. 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9 Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2